

Du preĝejoj, en Coventry kaj en Berlin, estis plene detruitaj per bomboj dum la dua mondmilito. En simbola akto de repaciĝo, homoj el Germanio kontribuis por novkonstrui la katedralon de Coventry, kaj inverse. En ambaŭ urboj tagmeze de ĉiu vendredo oni preĝas la samajn vortojn. Jen la esperanta traduko. (Adoru 867)



La repaciĝa preĝo de Coventry

*Ĉiuj estas pekintaj kaj mankas al ili gloro,
kiun ili devus havi ĉe Dio.*

La malamon, kiu dividas rason de raso,
popolon de popolo, klason de klaso,

Patro pardonu.

La akaparajn dezirojn de homoj kaj nacioj
por posedi, kio al ili ne apartenas,

Patro pardonu.

La avidon, kiu ekspluatas la laboron de la
homoj kaj dezertigas la teron,

Patro pardonu.

Nian envion pri la bonfarto kaj feliĉo de
aliaj,

Patro pardonu.

Nian indiferenton pri la mizero de
kaptitoj, senhejmuloj kaj rifuĝintoj,

Patro pardonu.

La volupt-amon, kiu pereigas la korpojn de
viroj, virinoj kaj infanoj,

Patro pardonu.

La orgojlon, kiu nin misgvidas fidi nin mem
pli ol Dion,

Patro pardonu.

*Estu bonfaraj unu al alia, bonkoraj,
pardonantaj unu al alia, kiel ankaŭ Dio en
Kristo pardonis al vi.*

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yaho.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec₉

ENHAVO

Protestantismo	51
Ĉeesto de la baptistoj en Niĝerio	54
Pensoj pri amo	57
La fantoma kavalerio el la Unua Mondmilito	58
Martin Luther pregas novan kulturalan lingvon	60
Unua Ekumena Esperanta kongreso	61
Tagordo de la jarkunveno 2017	63
Financaj raportoj	64
La dresdena Sinjorina preĝejo	68
Informetoj	69
Nekrologoj	71
Bone, ke mi Kriston havas	72

Redaktoraĵo vortoĵo

Unue mi volas pardonpeti ke en la pasinta numero estiĝis eraroj dum la enpaĝigo. Pro tio vi en la nuna numero de Dia Regno, denove trovos la artikolon de Karl Heinz Schaeffer pri Luther kaj la nova kultura lingvo.

Due mi konstatis ke ĉi-foje estis iom malmultaj la artikoloj kiuj alfluis al la redaktoro kaj al DR. Espereble tio ŝanĝiĝos aŭtune, kiam multaj povos raportoj pri someraj travivaĵoj. Ĉu mi esperu?

En la nuna numero vi trovas la financajn raportojn pri la agado de KELI dum 2016. Jam dum pluraj jaroj vi ne trovas sekretarian raporton, ĉar la landaj agadoj estas malmultaj. Vi eĉ trovas informon ĉi-numere ke KUNE, la nederlanda sekcio, malfondiĝis. Triste! Simile la sveda sekcio decidis pri malfondiĝo.

Tamen ni ne malesperu pri la estonteco de KELI!

Protestantismoj

Daŭrigo de la dua parto de prelegserio — La Biblio kaj la Fido

Philippe COUSSON, FR

Daŭrigo de numero 2/2017

Tamen, ĉar temas pri alia branĉo de la “reformitaj” eklezioj, mi parolos pri tiu branĉo de la Reformacio kiun oni nomas “la humanisma Reformacio”, aperinta en germanlingva Svislando.

Ĉefa rolulo estis Huldrych (Ulrich) Zwingli (1484-1531). Post studoj en Berno, Vieno kie li kunstudis kun Johann Eyck, Bazelo, li fariĝis pastro, legis la grekajn kaj latinajn Patrojn, renkontis Erasmon, estis kapelano de la dungitaj svisaj soldatoj en Marignan 1515. Li studis la grekan Novan Testamenton de Erasmo kaj alvenis al kelkaj konkludoj: La Biblio estas la sola viv-regulo, Kristo estas la kapitano en nia batalo kontraŭ la peko kie li sin oferas por sia trupo. “Li ne iris de la Biblio al Kristo sed de Kristo al la Biblio”.

Legi Luteron konfirmis kion li trovis. Li predikis en la kanonika preĝejo en Zuriko, kaj konvinkis la Konsilantaron de la urbo transiri al la Reformacio (1523) per siaj 67 tezoj. Ili aboliciis la sakramentojn, la indulgencojn, la kulton al la bildoj kaj al la bonfaroj.

Sed en disputo en Badeno sen Zwingli, (1526) Johano Eyck venkis kaj Zwingli estis kondamnita. Tamen, la Reformacio venkis en Berno 1528. En la kolokvo de Marburg estis malkonsento inter li kaj Luther pri la Sankta Manĝo.

En 1531 okazis milito inter la katolikaj kantonoj kaj la protestantaj. En la batalo de Kappel, Zwingli mortis.

Fakte la alemana (germanlingva svisa) Reformacio estas sub influo kaj de Erasmo kaj de Karlstadt.

Erasmo (mortis en 1536) kiu estis pli eŭropa ol holanda post studado en lernejo de la “Fratoj de komuna vivo” multe vojaĝis kaj instaliĝis en Bazelo kie li verkis plej multe. La Reformacio tie puŝis lin al Freiburg, sed li revenis en Bazelon kie li mortis. Li estigis la tiutempe plej seriozan eldonon de la greka Nova Testamento (*Textus receptus*). Li estas la aŭtoro de alegoria rakonto, *La laŭdo de la stulteco*. Li



Zwingli /Hans Aspen 1531

rifuzis forlasi la Roman Eklezion sed rifuzis ankaŭ proponitan kardinalecon. Oni tamen indeksigis liajn verkojn. Estis akra disputo inter li kaj Luther.

Johann Heinrich Bullinger (1504-1579), kiel Erasmo filo de pastro kaj lernanto de la “Fratoj de la komuna vivo”, post studado kaj instruado aŭdis Zwingli prediki kaj sekvis lin al Zuriko. Li edziĝis kaj fariĝis laŭdire bona patro. Li ricevis la paroĥon de sia patro sed li devis foriri ĉar la tiea kantono post Kappel reiris al katolikismo. Li fariĝis posteulo de Zwingli en Zuriko, kompletigis la laboron de tiu, konvinkis la urbon ne forlasi la Reformacion, instalis la rilatojn inter la ŝtato kaj la eklezio, ofte predikis, multe korespondis ĉefe kun Théodore de Bèze, neniu persekutis. Li estis la redaktinto de la **Posta svisa konfeso**. Li estis teologo, historiisto kaj pedagogo.

Mi simple mencios la reformatorojn de kelkaj svisaj kaj sud-imperiaj urboj. En Bazelo estis Okolampado (Johanes Hausschein), en Berno Berthold Haller, en Strasburgo Mateo Zell, edzo de Katarina Schütz, Martin Bucer, Wolfgang Köpfel (Kapitono) kaj Jakobo Sturm. En Strasburgon i.a. venis multaj francaj rifuĝintoj kiel Kalvino. La Strasburga Reformacio estis ankaŭ influita de Karlstadt. La Strasburga liturgia fariĝis modelo por la kalvinana, do por multaj poste.

Kvar urboj kolektiĝis por verki konfesion, la ”tetrapolitanan” konfesion (Strasburgo, Memmingen, Konstanco kaj Lindau). Sed iom post iom ili ĉiuj alproksimiĝis al la luteranismo de la konkordo de Wittenberg 1536.

Tiu germanlingva svisa reformacio vekis du gravajn disputojn kiuj daŭris en protestantismo. Ili tuŝas gravajn punktojn, nome la sakramentojn. Tion oni povas retrovi kiam oni legas la diversajn konfesiojn.

Pri la bapto leviĝis multaj demandoj, kiuj ankoraŭ dividas.

Kiu agas en la bapto, ĉu Dio, ĉu la homo (la baptinto, la familio, la Eklezio)? Ĉu oni prenas aŭ ricevas la bapton? En kiu aĝo – ĉu infanaĝe? Ĉu nur konsciaj plenkreskuloj? Kiel bapti – gutoj sur la kapo aŭ subakvigo? Kion valoras? Ĉu simbola aŭ aganta? Ĉu ĝi estas ordono de Dio? Ĉu necesa por la savo?

Ĉu gravas la asertata fido? Ĉu gravas la interligo kun Dio? Ĉu la signo estas individua aŭ komunuma? Ĉu la ceremonio estu privata aŭ publika? Ĉu nur unu fojon?

Rapide tiuj demandoj leviĝis. Du homoj gravas tie. Conrad Grebel (1498-1526) unue kunlaboranto de Zwingli sed poste disiĝis de li kiam la urbo devigis la bapton de infanoj. Lia grupo estis nomita anabaptistoj. Balthasar Hubmaier (1481-1528), germano, lerninto de Eyck, pastro ĉe la landlimo, post kontaktoj kun anabaptistoj konvertiĝis, fuĝis al Zuriko kaj poste al Moravio kie li estis bruligita.

Estis anabaptistoj kiuj rapide fariĝis perfortuloj, ekzaltitoj, ribeluloj, ekzemple dum la kamparanaj militoj aŭ en la urbo Münster. Aliaj estis pacistoj, kiuj volis nepre disigi la eklezion de la ŝtato. Ili verkis la konfesion de Schleithem (1527). Grupo el tiuj estis revigligita de iama holanda pastro Menno Simmons

(1496-1561) kaj oni nomis tiujn mennonitoj post lia morto. En 1632 la mennonitoj kunvenis en Dordrecht kaj reviziis la konfesion de Schleithem. Ilia pacismo kondukis ilin al Rusio kaj fine de la 19a jarcento al norda Ameriko kie jam aliaj setlis ekde 1640.

El anabaptista fono naskiĝis en Holando kaj Anglio la baptistaj eklezioj. La unua konfeso baptista estis verkita en Londono en 1644. La Sankta Manĝo estas memorigo de la lasta vespermanĝo de Kristo. La bapto estas identiĝo publika kun la morto kaj releviĝo de Kristo. Baptoj troviĝas ofte ene de la preĝejoj. Ili fariĝis grandaj misiistoj kiel ekzemple William Carey. Inter la baptistoj troviĝas “kalvinanoj” kaj “arminianoj”. Mi citas kelkajn nomojn: Charles Spurgeon, Thomas Cook, Martin Luther King aŭ Jimmy Carter.

En la 19-jarcenta Granda Vekiĝo aperis inter presbiterianoj ĝuste ĉirkaŭ i.a. la bapto.

Barton Stone (1772-1844), iam presbiteriana pastoro, partopreninto en la Vekiĝo de Cane Ridge (1801) konsistigis novan eklezion kun la simpla nomo “kristana eklezio”. Al li kuniĝis du nordirlandaj pastoroj enmigrintaj same presbiterianaj. Iliaj motoj estis: la Skribo sed ne la doktrinoj, la esenco de kristanismo estas la bapto kaj la agnosko de la dieco de Jesuo Kristo. Ili diris ke la bapto, plenkreskula, subakviga havas savan efikon kaj necesas. Tiu movado, nomita ankaŭ Restaŭrado, estas tre kongregacia movado preskaŭ sen supra strukturo. “Diri kion diras la Skribo, silenti kiam ĝi silentas”. Pluraj grupiĝoj ekzistas, kelkaj sen muzikinstrumento,

kelkaj tre ekumenismaj, kelkaj kvazaŭ evangelikaj, ktp.

Pri la Sankta Manĝo la debatoj estis pli akraj en la 16a jarcento ol ili estas nun, tamen nuancoj restas. Kelkaj punktoj: Kristo ĉeestas, ĉu sub la formo de pano kaj vino (por la kredanto aŭ por ĉiuj, per la prononcitaj paroloj kaj/aŭ per la fido de la kredanto aŭ de la Eklezio), ĉu spirite, tiam pano kaj vino estas videblaj signoj kiuj markas la unuiĝon al la sankta korpo de Kristo. La Sankta Manĝo estas memorigilo kiu rememoras kaj/aŭ revivigas la morton de Kristo kaj/aŭ la lastan vespermanĝon dividitan kun la disĉiploj.

Ĉu la pano kaj vino estas la korpo kaj sango de Kristo? Estis proponita tiu bildo: la blankarda fero estas kaj fero kaj fajro. Post malvarmiĝo ĝi estas nur fero.

La ĉefa distingo okazis inter Reformitaj Eklezioj kaj Luteranaj, sed tio preskaŭ ne plu validas post la Konkordo de Leuenberg (1973).

Tiuj du unuaj artikoloj, fakte kvar partoj kunigitaj duope, volas montri, kiel la sekvantaj, la unuecon kaj diversecon de protestantismo. Ni jam vidis la gravecon de kelkaj temoj: la Biblio, kiel fonto al kiu oni rekte devas iri, la fido kiu permesas al la kredanto vivi sen timo pri savo, la graco kiu promesas la savon al la kredanto, kaj la sakramentoj kiuj konkrete portas la mesaĝon de la Evangelio.

Ni poste renkontiĝos kun novaj personoj kaj novaj temoj kaj novaj grupoj aŭ eklezioj.



Ĉeesto de la baptistoj en Niĝerio:

Rilato kun aliaj eklezioj en la lumo de 500 jaroj de la protestanta reformacio

Adebayo Ola Afolaranmi,

Historiaj radikoj de la ĉeesto de baptistoj en Niĝerio

Pastoro TJ Bowen (misiisto de Southern Baptist Convention de Ameriko) komencis la laboron de la Baptista konfeso en Niĝerio en 1850. En 1854, li konstruis la unuan baptistan preĝejon en Niĝerio en Ijaye-Orile, vilaĝo proksime al Ibadan. Malgraŭ internaj kaj intertribaj militoj, baptista laboro disvastiĝis en la sudokcidento de Niĝerio poste kun multaj indiĝenaj misiistoj kiel Moseo Ladejo Stone aligante aliajn usonajn misiistojn. Je la unua duono de 20-a jarcento, baptista laboro disvastiĝis al la norda parto de Niĝerio per la klopodoj de praloĝantoj de Ogbomoso kiuj migris tien. Ankaŭ, antaŭ tiu tempo, baptista ĉeesto en la orienta parto de Niĝerio estis videbla laŭ la klopodoj de kelkaj homoj kiel J.T Princewell kaj George Amakiri.

Baptista nuna statuso kaj pliaj koheraj perspektivoj en Niĝerio

Hodiaŭ, ekzistas pli ol 10.000 baptistaj preĝejoj en Niĝerio kun proksimume 3 milionoj da baptitaj membroj kaj ĉirkaŭ 6,5 milionoj da adorantaj membroj. Ekzistas miloj da baptistaj lernejoj, hospitaloj kaj aliaj konstruaĵoj de la Nigerian Baptist Theological Seminary, Ogbomoso (unu el la gvidaj evangeliaj

ekleziaj akademioj en Afriko) kaj Bowen University (la unua kaj sola baptista universitato en Afriko) en la avangardo. Baptista laboro disetendiĝas ĉiutage en Niĝerio kaj en Afriko. La konfeso de niĝeriaj baptistoj (the Nigerian Baptist Convention) agas ĉefrolon en ekumenaj agadoj en Niĝerio. Ĝia prezidanto, Pastoro D-ro. Supo Ayokunle, estas la nuna prezidanto de Kristana Asocio de Niĝerio – la tegmenta asocio de ĉiuj kristanoj en Niĝerio.

Kio estas Lutero, Kalvino kaj reformacio por niĝeriaj baptistoj

La reformacio, kiun Marteno Lutero, Kalvino, Ulrich Zwingli kaj similaj kondukis, estas tre grava por la niĝeriaj baptistoj ĉar ĝi kondukis al la plia “reformo” de la fondintaj gvidantoj de la baptistoj tutmonde kiel John Smyth, Thomas Helwys kaj Roger Williams. La niĝeriaj baptistoj estimas ĉi tiujn reformistojn pro tio ke ili malfermis la okulojn de homoj por la prava Biblia instruado en kontrasto kun la tradicioj de la Romkatolika eklezio. La niĝeriaj baptistoj akceptas tiujn reformantojn kiel liberigantojn kiuj liberigis kristanojn de homfaritaj principoj kaj reguloj kaj kondukis kristanojn al la Biblio kaj Dio.

Kion signifas esti niĝeria baptisto

Esti niĝeria baptisto signifas esti kristano kiu konscie akceptis Jesuon Kriston kiel sian personan Savanton kaj Sinjoron, kaj kiu, post sciinte kion signifas esti Kristano, estis baptita per mergo. La niĝeria baptisto enkulturigas sian afrikan kulturon en kio estas nomita ekstera aŭ eŭropa kulturo en formo de kristana tradicio kondiĉe ke la afrika kulturo ne neas la instruadon de la Nova Testamento. Iuj de ĉi tiuj kristanaj tradicioj kiuj estis naskiĝintaj en Eŭropo jam estis ŝanĝitaj por reflekti la afrikan kulturon. La instruado de la Nova Testamento estas la parametro kiun niĝeria baptisto uzas por determini siajn kondutojn kaj praktikojn.

Atendoj de la niĝeriaj baptistoj de la 500-a datreveno de la reformacio

Dum ni festas la 500-an datrevenon de la reformacio ĉi-jare, la niĝeriaj baptistoj atendas ke la prava doktrino de la vorto de Dio amplifita en la Nova Testamento estu emfazita en ĉiu eklezio. Simile, la niĝeriaj baptistoj atendas ke pli da penoj estu metitaj en disvastigado de la Evangelio, plenumante la Grandan Komisionon, kaj loke kaj tutmonde. Plue, la niĝeriaj baptistoj atendas pli koran rilaton inter ĉiuj eklezioj kaj/aŭ kristanaj konfesioj por povi alfronti nian komunan malamikon – la diablon – kaj liajn kohortojn.

La plej grandaj defioj por la niĝeriaj baptistoj

Inter la plej grandaj defioj por la niĝeriaj baptistoj estas: 1) persekutado de kristanoj en la norda parto de Niĝerio; 2) mondumo kaj materiismo, kiuj rampis en la Eklezion, pro kiuj estas malfacile

diferenciĝi inter la Eklezio kaj la mondo; 3) la tasko de evangelizado kaj misioj kiuj iĝas maloportunaj pro varmeta sinteno de multaj eklezioj por la tasko; 4) kiel ekvilibrigi la baptistan kredon je apartigo de eklezio kaj ŝtato kaj aktiva partopreno de kristanoj en politiko; 5) pensi pri la malpli privilegiituloj ĉefe la homoj delokitaj de konfliktaj lokoj.

Rilatoj inter la Konfesio de la Niĝeriaj Baptistoj kaj la eŭropaj kaj usonaj eklezioj kaj kun la Monda Alianco de la Baptistoj (Baptist World Alliance)

La Konfesio de la Niĝeriaj Baptistoj havas korajn rilatojn kun la eŭropaj kaj usonaj eklezioj kaj kun la Monda Alianco de la Baptistoj. Ĝi partoprenas aktive en la aktivecoj de la Monda Alianco de la Baptistoj kaj Monda Konsilio de Eklezioj (World Council of Churches). Ĝiaj ĉefoj kontribuas multe al ekumenaj diskutoj kaj aliaj nuntempaj aferoj, kiuj temas pri kristanismo ĝenerale kaj pri rilato kun aliaj homoj en la mondo. Multaj niĝeriaj baptistoj estas eĉ estraranoj de tiuj tutmondaj korporacioj.

La specifa kontribuo de la sperto kaj la interkonsiliĝo de la niĝeriaj baptistaj eklezioj al la granda baptista tradicio

Aŭtonomeco de loka eklezio estas unu el la tradicioj de la baptistoj tutmonde al kiu la niĝeriaj baptistaj eklezioj specife kontribuis. Certe, multaj baptistaj eklezioj en Niĝerio jam misuzis tiun tradicion. Tamen lobiado por respondeca aŭtonomio de loka eklezio estas tio, kion la Konfesio de la Niĝeriaj Baptistoj antaŭenigas inter la eklezioj kiuj kun-

laboras kun ĝi, kaj en aliaj baptistaj asocioj kiel Kunveno de Tutafrikaj Baptistoj (All-Africa Baptist Fellowship) kaj Monda Alianco de la Baptistoj.

Rilatoj inter la niĝeriaj baptistaj eklezioj kaj aliaj afrikaj kristanaj eklezioj kaj atendo de la rilato kun la Romkatolika eklezio

Niĝeriaj baptistaj eklezioj rilatas kore kun aliaj kristanaj eklezioj tra organizoj kiel Kristana Asocio de Niĝerio, Bibliosocieto de Niĝerio (Bible Society of Nigeria), Kristana Konsilio de Niĝerio (Christian Council of Nigeria), kaj Monda Konsilio de Eklezioj. Niĝeriaj baptistaj eklezioj estas aktivaj membroj de ĉi tiuj menciitaj korpoj. Multaj el la ekleziaj gvidantoj kaj membroj de la niĝeriaj baptistaj eklezioj estas estraranoj de ĉi tiuj ekumenaj korpoj. Kiel

deklarite antaŭe, la prezidanto de la Konfeso de la Niĝeriaj Baptistoj, pastoro d-ro. Supo Ayokunle, estas la nuna prezidanto de Kristana Asocio de Niĝerio – la tegmenta asocio de ĉiuj kristanoj en Niĝerio. Tamen: kiom niĝeriaj baptistaj eklezioj, ĝiaj gvidantoj kaj membroj volas rilati kore al Romkatolika eklezio, tiom la lasta ne recipokas la koran rilaton.

Pastoro Bayo Afolaranmi estas ordinita pastoro de la Konfeso de la Niĝeriaj Baptistoj. Li kunordigas la retan servon de la Konfeso en ĝia ĉefsidejo en Ibadan, Niĝerio. Li estas Majstro de Teologio en Religia Edukado de la Nigerian Baptist Theological Seminary, Ogbomoso, Niĝerio kaj alia majstro de Filozofio en Konflikto Rezolucio kaj Repacigo de Trinity College Dublin, Irlando.

☪

MELODIOJ

En Egiptujo oni adoris katodiinon: Basteton.

En Japanujo oni kultis katodiojn: Nekogamiojn.

Aŭdinte tion, la meloj en la ĝermanaj praarbaroj grumblis:

Kial nur katojn? Kial ne ankaŭ nin, la melojn?

Tiamaniere estiĝis la MELODIOJ.

Albrecht Kronenberger 2016-12-15

Pensoj pri la amo

Julia Sigmond, IT/RO

La plej forta kaj valora homa sento estas la amo.

Eble oni devus inventi iun novan vorton anstataŭ la vorto “sento”.

Ja la amo estas ne nur sento, sed ankaŭ energio, kaj ankaŭ forto kaj ankaŭ saĝeco, kaj ĝi estas kapableco, kaj “io”, kio fakte estas nepriskribebla, nekomprenebla kaj neperceptebla homa eco.

Ĝi estas nekredeble valora donaco por la homo.

Treege bonŝancaj estas tiuj homoj, kiuj naskiĝas kun la kapablo de amo, nome kiuj denaske kapablas ami.

Gravas la demando: ĉu eblas lerni la amon?

Laŭ mi: JES! Ja estas multe pli facila ami ol malami!

La sento de la amo ververe estas tre agrabla sento.

Se ni vivas en amo, ni sentas ties varmon, trankvilecon, certecon, ties bonodoron.

Iun specialan kontentiĝon kaj ĉion supereblan, al nenio kompareblan feliĉon, ĉion venkeblan forton.

Se ni vivas en amo, ni pli similas al elegante flugadanta belega papilio, ol al pezmome lamanta kolosa olda elefanto.

Nia vivo estas multe pli facila, se ni povas ami.

Kaj ni, kiuj kapablas ami, ni havas grandegan taskon: ni devas helpi tiujn, kiuj vivas sen amo.

Tiu tasko ne estas nur teorio, sed – kelkfoje – ĝi estas kruele penega praktiko.

La rezulto tamen senkondiĉe meritas la penon, ke ni helpu la homojn sen amo vivantajn.

Unue pensu kaj serĉu similajn homojn inter viaj familianoj, poste en via proksima kaj malproksima medio.

Tre grave estas, ke ni helpu ĉi “novfeliĉulojn”, ke ankaŭ ili komencu helpi aliulojn!

La nombro de la ami kapablaj homoj konstante devas kreski.

Iu povus pensi, ke mi estas naiva.

Sed se tiu “iu” nur unu homon sukcesos instrui ami, tuj ŝanĝiĝos lia opinio!

Tiel grandan feliĉon li eksentos, ke fine li kapablos kompreni: se absolute nenion li faris dum sia vivo, nur li sukcesis instrui al unu homo AMI, jam li ne vivis vane!

Kiu provos, tiu konvinkiĝos.



La fantoma kavalerio el la Unua Mondmilito

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

En ĉi tiu artikolo mi raportas pri malmulte konata evento el la jaro 1918, kiu antaŭsignas tre gravan eventon en la estonteco.

La evento okazis inter aprilo kaj aŭgusto de 1918, proksime de Bethune, Francujo, meze de la tranĉeoj inter Ypres, Belgujo kaj la francaj urboj Arras kaj Bailleul. Kapitano Cecil Wightwick el la brita armeo havis la respondecon pri la spionado en tiu sektoro. La kapitano establis sian sidejon en Bethune, bela urbo kiu ĝis tiu tempo ricevis malmultan damaĝon.

La britaj soldatoj batalis dum semajnoj sen ripozo aŭ helpo. Ili suferis grandajn perdojn, kaj ili estis tre ellaciĝintaj. La germana armeo atakadis per granda nombro da homoj kaj pafiloj. Je la fino de marto de 1918, kapitano Wightwick ricevis informon ke trupoj el Portugalujo pasos tra Bethune por helpi la britan armeon kaj transpreni sektoron de la fronto.

La germana artilerio senĉese bombardis la britajn soldatojn, kiuj jam estis kvin kilometrojn malantaŭ la fronto. La grandaj eksplodoj skuis la teron kaj sensobtizis ilin. Tiam granda pluvo de obusoj falis sur la portugalajn trupojn, detruante ilin. La malmultaj portugalaj soldatoj kiuj ankoraŭ vivis, stumblis tra Bethune. Por eskapi rapide for el la

katastrofo, ili forĵetis siajn fusilojn kaj ekipaĵon. La germanaj trupoj komencis kuri tra la breĉo en la aliancaj vicoj.

Ĉiuj homoj en Britujo timis ke la germana armeo fine atingos Parizon kaj ankaŭ ke la germana artilerio povos bombardi la britajn havenojn el la franca marbordo. La kristanoj el Usono, Britujo, kaj Kanado preĝadis por la ŝirmo de la aliancaj armeoj. (La germana imperiestro havis mesiajn iluziojn. Li deziris venki Palestinon kaj okupi Jerusalemon, kaj tiam prezenti sin kiel la nova Mesio.)

Tiam tre stranga afero okazis. La germana artilerio, kiu estis detruanta Berthune-n, subite komencis bombardi kampon preter la urbo. Tiu kampo estis malplena, sen domoj, sen arboj, kaj sen homoj. La germanaj maŝinpafiloj forte pafis. “Fritz' frenezas,” diris serĝento al kapitano Wightwick. “Ili pafas sur malplenan teron. Kion ili esperas efektiviĝi?” La kapitano miregis. Li ne komprenis kial la germanaj soldatoj pafas sur lokon kie ne estas trupoj! Kiam Wightwick pasis tra la detruita urbo, la pafado subite ĉesis kaj stranga silento falis sur la batalkampon. Subite birdo eksonis, kantante kanton kiun li ankoraŭ povis aŭdi jarojn poste.

La serĝento kaj aliaj soldatoj staris proksime de obuskavo. Ili svingis siajn ĉapelojn kaj kriegis, “Fritz' foriras!” La

kapitano vidis grandan vicon da germanaj trupoj. Kiam li rigardis, la vico haltis kaj la bone ekzercitaj soldatoj forĵetis siajn fusilojn kaj tornistrojn, kaj forkuris. La serĝento alportis du germanajn kaptitojn al kapitano Wightwick. La du kaptitoj estis oficiroj. Unu el ili raportis ke ili rigardis la kampon malantaŭ Bethune kiam ili subite vidis kavalerian brigadon kiu alproksimiĝas tra la fumo. La rajdantoj surportis blankajn uniformojn, kaj ili rajdis sur blankaj ĉevaloj. La obusoj krevis inter la rajdantoj kaj ĉevaloj; sed ili malrapide troitis kvazaŭ ili promenas. La maŝin-pafiloj enfiladis la kavalerion kun pluvo de plumbo. Spite tion neniu rajdanto, neniu ĉevalo falis. Ili daŭrigis antaŭeniri sub la brila suno.

Ĉe la fronto de la kavalerio rajdis la komandanto. Lia haro brilis kiel oro, kaj lia grandega blanka batalĉevalo majeste portis lin. La komandanto portis grandan glavon en unu mano kaj li tenis la kondukrimenojn en la alia. La kavalerio antaŭeniris kiel nehaltigebla tajdo. Tiam la germanaj trupoj pleniĝis de paniko kaj forkuris.

“Povos okazi bataloj ankoraŭ,” flustris la germana oficiro. “Sed la germana armeo estas rompita. Ni perdis la militon pro la Blanka Kavalerio. . . Ni estas venkitaj.” Kapitano Wightwick pridemandis multajn kaptitojn, kaj iliaj raportoj konsentis kun tiu de la maljuna oficiro el la Prusa Gardistaro. Neniu brita soldato ankoraŭ estis vidinta la Blankan Kavalerion.

Mi legis pri ĉi tiu evento antaŭ pli ol 55 jaroj. Mi nun trovas pli multajn

detalojn per la interreto. La Fantoma Kavalerio el la Unua Mondmilito rilatas al profetaĵo de Apokalipso. Tiu libro antaŭdiras la alvenon de la Antikristo, terura diktatoro, kiu regos la tutan mondon je la fino de la nuna erao. Lia regno nur daŭros sep jarojn, sed dum tiu tempo li mortigos multajn homojn. Jesuo Kristo diris: “*Kaj se tiuj tagoj ne estus mallongigitaj, neniu karno estos savita; sed pro la elektitoj tiuj tagoj estos mallongigitaj.*” (Mateo 24: 22)

Post la sep jaroj (la 'Granda Aflikto' laŭ la Biblio) de la regno de la Antikristo, okazos la Batalo de Har-Magedon. Har-Magedon estas kamparo norde de Jerusalemo. La armeoj de la mondo kunvenos tie por batali inter si. Je la fino de la batalo, Jesuo Kristo aperos ĉe la fronto de la armeoj de la ĉielo. Ni legas en Apokalipso 19: 11-16, 19-21 kio okazos:

11 Kaj mi vidis la ĉielon malfermitan; kaj jen BLANKA ĈEVALO, kaj la sidanta [Jesuo Kristo] sur ĝi, nomata FIDELA kaj VERA; en justeco Li juĝas kaj militas.

12 Kaj Liaj okuloj estas fajra flamo, kaj sur Lia kapo estas multaj diademoj; . . .

13 Kaj Li estas vestita per vesto, trempita en sangon; kaj Lia nomo estas: LA VORTO DE DIO.

14 Kaj la armeoj en la ĉielo sekvis Lin sur BLANKAJ ĈEVALOJ, vestite per BISINO BLANKA KAJ PURA.

15 Kaj el Lia buŝo eliras AKRA GLAVO, por ke Li per ĝi frapu la naciojn; kaj Li regos ilin per fera sceptro; kaj Li tretas la vinpremilon de la furiozeco de la kolero de Dio, la Plejpotenca.

16 Kaj Li havas sur la vesto kaj sur la femuro nomon skribatan: REĜO DE REĜOJ KAJ

SINJORO DE SINJOROJ.

19 Kaj mi vidis la Beston [la Antikriston], kaj la reĝojn de la tero kaj iliajn armeojn, kunigitajn, por fari militon kontraŭ la sidanta sur la ĉevalo kaj kontraŭ Lia armeo.

20 Kaj la Besto [la Antikristo] estis kaptita, kaj kun ĝi la Falsa Profeto, kiu faris antaŭ ĝi la signojn, per kiuj li trompis tiujn, kiuj ricevis la markon de la Besto kaj adorkliniĝis al ĝia bildo; ili ambaŭ estis ĵetitaj vivaj en la lagon fajran, brulantan per sulfuro;

21 kaj la ceteraj estis mortigitaj per la glavo de la sidanta sur la ĉevalo, la glavo, kiu eliris el Lia buŝo; kaj ĉiuj birdoj satiĝis per ilia karno.

Kontraste al la komandanto de la Blanka Kavalerio, Jesuo Kristo (verŝajne la sama homo) ne portos materialan glavon, sed akra glavo eliras

el Lia buŝo. Jesuo Kristo estas la Kreinto (S. Johano 1:1-3). Li kreis la mondon nur per diri la vorton; Li venkos la Antikriston kaj detruos la armeojn de la mondo per la vorto (la glavo) kiu eliras el Lia buŝo.

La Blanka Kavalerio kiu eliris por defendi la aliancajn armeojn dum la Unua Mondmilito certe estas vera historia fakto. Kaj la profetaĵo el Apokalipso pri la Alveno de Jesuo Kristo kun la armeoj de la ĉielo okazos laŭlitere! Iu homo, per fido en Jesuo Kristo, povos aparteni al la armeoj de la ĉielo. Mi volas esti inter tiuj armeoj. Mi esperas ke ankaŭ vi volos esti inter ili.



Pro eraroj faritaj dum la redaktado de la pasinta numero, la jena artikolo estas denove publikigita. /Red

Plia aspekto okaze de la 500a datreveno de la Reformacio:

Martin Luther pregas novan kulturen lingvon

Karl Heinz SCHAEFFER, DE

Martin Luther [Marteno Lutero] naskiĝis en 1483 en Eisleben, kie li ankaŭ mortis en la jaro 1546. Post kiam preskaŭ trafis lin fulmo, li promesis solenan voton kaj sekve aliĝis al la ermitoj de Sankta Aŭgusteno en la urbo Erfurto. 1507 li estis ordinata kiel sacerdoto kaj ekstudis teologion. 1512 li doktoriĝis kaj fariĝis profesoro

pri biblia interpretado ĉe la universitato de Wittenberg. Grava punkto en liaj prelegoj estis lia opinio, ke oni ne povas akiri la Dian gracon per propra agado, sed ke ĝi estas donaco, kiun la homo povas akcepti nur kun humileco.

Ĉefe, li serioze kontraŭis al iuj religiaj praktikoj kaj deklaroj, speciale kontraŭ la tiam kutimaj komercaj

indulgenc-biletoj kaj eldonis en 1517 liajn famajn 95 tezojn pri la indulgenco. La celo estis, ke li volis instigi sciencan disputon pri la temo. La tezoj gvidis al granda publika eĥo kaj fine por li kaj siaj adeptoj al la t.n. proskribo, ĉar Lutero ne esprimis la postulatan kontraŭdiron. Pro tio ŝajne kaptis lin lia suvereno, princelektisto Frederiko la Saĝulo, kaj alportis lin al la sekura burgo Wartburg. Tie li i.a. tradukis la Novan Testamenton en nova maniero en la germanan lingvon.

Post dek monata restado en la burgo revenis Lutero al Wittenberg kaj devis tie dum jaroj alfronti kontraŭ multaj malamikoj kaj atakoj el diversaj kampoj, dum li kaj eminentaj sekvantoj laboris por konstrui reformitan eklezion (i.a. por evoluigi germanan meson). Lutero skribis tiam sennombrajn verkojn pri teologiaj kaj politikaj temoj kaj laboris tie (kune kun kolegoj), ĝis la kompletiĝo en 1534, pri la kompleta traduko de la Biblio en la germanan. Tiu estis presita en la sama jaro en Wittenberg kaj rapide iĝis sensacia sukceso. Ĝis la morto de Lutero aperis pli ol 400 eldonoj!

Restas nun la demando, kial eblis tiu giganta sukceso post miljaraj tradukprovoj? La merito de Lutero estis, ke jam lia unua traduko estis farita en mirinda lingvo, kaj oni komprenas ĝin ankoraŭ hodiaŭ sen tradukado. Ni alrigardu nun pli detale lian tradukadteknikon. Por Lutero estis unu – sed tute ne ununura – tradukbazo la en la eklezio uzata latina *Biblio Sacra Vulgata*. La komenco de la Genezo tekstas tie: *In principio creavit Deus caelum et terram / terra autem erat inanis et vacua / et*

tenebrae super faciem abyssi et spiritus Dei ferebatur super aquas. – Certe estis dum la tempo de Lutero neniu vorto netradukita tie, sed li havis por kelkaj vortoj siajn malfacilaĵojn por elekto, ekzemple la vorton por “spiritus”. Ĝi ja signifas en tiu kunteksto “aero”, “spiro”, “vivospireto”, sed ankaŭ “suspiro”. En aliaj tradukoj oni trovas ankaŭ por ĝi “vento”. Lutero rimarkis al tio ĉi: “Vento en tiuj tagoj ankoraŭ ne ekzistis, do ĝi devas signifi la Sanktan Spiriton.” Tiun aliron oni nur povas trovi genia. Lutero tradukis tre libere. Li ne gluiĝis al la latina, greka aŭ hebrea originaloj. Li orientiĝis je tio, kiamaniere la germana lingvo estis parolata en la popolo. Laŭvorte li ĉiam demandis sin, ke oni devas rigardi, kiel la “patrino en la domo, la infanoj sur la stratetoj” kaj la “normala viro sur la foirplaco” estus dirantaj iun frazon, rigardante al iliaj buŝoj.

La bazo de la tradukarto de Lutero estis la Saksa kancelaria lingvo, ĉar estis penado por privenki la multajn dialektojn en la tradukado, kiuj estis parolataj en Germanujo. Taŭga komungermana tegmenta kultura lingvo ankoraŭ ne ekzistis. En orienta meza Germanujo setlantoj ekloĝis el multaj germanaj dialektregionoj. Sekve ekestis tie miksaĵo de lingvoj, kiu estis sufiĉe facile komprenata de ĉiuj germanoj. Al tiu miksaĵo Lutero apogis sin. Kune kun siaj propraj klopodoj aperis tiu lingvo, kiu estas nomata la komungermana lingvo nuntempe. Tiel Lutero povis pruvi, ke regionaj lingvoj povis esti taŭgaj por kulturlingvoj.


Unua Ekumena Esperanta Kongreso

Sekvontjare estos 50 jaroj post la 1-a EEK en Limburg/Lahn. Ĝin partoprenis 200 esperantistoj, membroj de KELI kaj IKUE, venante el 18 landoj.

Apude vi vidas la aliĝilon de nia sekretario kiu partoprenis la kongreson. KELI kaj IKUE faris unu komunan numeron Dia Regno – Espero katolika.

Ĝi estas trovebla ĉe:

www.esperokatolika.org/ek19661970/



**En Dia Regno
antaŭ 49 jaroj**

Al esplora demando dum la ekumena kongreso pri la opinioj de la partoprenantoj Adolf Burkhardt respondis:

“Escepte de Boldern 1965, kiam mi estis en Tokio por la jubilea universala kongreso de Esperanto, mi partoprenis en ĉiuj KELI-kongresoj de Nijenrode 1959 ĝis Torre Pellice 1967. El ĉiu el ili mi hejmeniris pli riĉa, kunportante iun specialan sperton, ion aparte memorindan. Sed tio, kion mi pozitive ricevis el kongreso, neniam tiel nete superis tion, kion mi devis doni antaŭ kaj dum la kongreso, kiel en Limburg. Mi estas plena de danko al Dio pro la vere neatendita amplekso de komunaj konvinkoj, esperoj kaj klopodoj. Mi firme kredas, ke Dio per sia Sankta Spirito puŝis nin antaŭen sur vojo, kiun

ni ĝis nun rifuzis surpaŝi. Plej ĝojiga estas por mi la fakto, ke la bonan atmosferon ni ne atingis per tiama prisilentado de la diferencoj, sed ke, male, ĝi pli kaj pli kreskis spite de senkaŝa diskutado eĉ pri tiklaj punktoj. Eĉ interne de KELI, tian serĉadon al la faktoj, al la senvuala vero, al reciproka profunda informado kaj informiĝo sen neglekto de amo kaj amikeco, mi malofte aŭ neniam spertis. Post Limburg, kun pli da ĝojo kaj malpli da dubo mi daŭrigas labori en la kristana Esperanto-movado, por la Evangelio per Esperanto”.

Tagordo por la Jarkunveno de KELI 2017

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raportoj
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2018
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

- (12) *Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Václav Pospíšil, Pavel Polnický kaj Ágnes Ráczkevy-Eötvös. Ĉiuj estas reelekteblaj.*
- (13) *Propono ke la KELI-kongreso 2018 okazos en Poděbrady (Ĉeĥio)*

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

10. aŭgusto

Ho Dio, mi dankas Vin pro Viaj benoj.
Mia vivo portu fruktojn. Mi petas Vin, ke
oni eĉ en tempoj de malĝojo kaj sen-
iluziigo povos rikolti tiujn fruktojn. Mi
ĉiam honoru Vin.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74).
Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Financa raporto de KELI 2016 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2015	2016
Aktivoj			
	Stokoj de libroj	4.925,03	4.925,03
	Stoko de kasedoj, E-Misio	116,00	116,00
	<i>Provizo</i>	<u>5.041,03</u>	<u>5.041,03</u>
	Kasista kaso	0,00	0,00
	Sekretaria kaso	997,00	2.487,00
	UEA-konto kelk-p	9.303,32	7.180,95
	Ĝir-konto, CIC-banko	1.822,00	933,35
	Ŝpar-konto, CIC -banko	30.540,99	31.761,67
	<i>Monrimedoj</i>	<u>42.663,31</u>	<u>42.362,97</u>
	Sumo de aktivoj	47.704,34	47.404,00
Pasivoj			
	Kapitalo	22.473,33	21.670,57
	Rezulto de la jaro	<u>-802,76</u>	<u>-596,71</u>
	<i>Kapitalo entute</i>	<u>21.670,57</u>	<u>21.073,86</u>
	Dumvivaj membroj	2.240,50	2.122,50
	E-Misio	6.894,51	6.894,51
	Helpa kaso	1.658,58	1.850,08
	Kongresa rezerva kaso	1.823,48	1.823,48
	Literatura/Himnara kaso	12.941,57	12.941,57
	<i>Fondusoj entute</i>	<u>25.558,64</u>	<u>25.632,14</u>
	Kreditoroj (finna kaj brita kaso)	0,00	0,00
	Evidente	395,13	633,00
	KELI-abonoj de EK	0,00	25,00
	Kongresaj kotizoj	80,00	40,00
	<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>475,13</u>	<u>698,00</u>
	Sumo de pasivoj	47.704,34	47.404,00

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2016.12.31

Aktivoj

Stokoj

En la jaro 2016 ne ŝanĝiĝis la Stokoj de libroj aŭ kasedoj. Bezonus fari novan inventuron kaj malaltigi la sumon de la stokoj per la valoro de nevendeblaj libroj kaj kasedoj. Eblus ankaŭ sendi librojn kaj kasedojn al malriĉaj landoj aŭ al tiuj landoj, kie la kristanoj vivas minoritate.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU), kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický (CZ), kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno. KELI havas bankkontojn ĉe franca CIC-banko kaj ĉe UEA (kelk-p).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. La rezulto de la jaro 2016 estis bedaŭrinde negativa: -596,71 eŭroj.

Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj. En 2016 ne okazis gravaj ŝanĝoj ĉe tiuj ĉi fondusoj, nur je la Helpa kaso, kiu estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.

Transitajoj kaj pasivoj

En la jaro 2016, kiel en ĉiuj jaroj, KELI-anoj kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen.

KELI-anoj mendas la gazeton Espero Katolika tra la konto de kelk-p, tiu ĉi sumo jam estas transkontigita al IKUE.

La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ- kaj kongreskotizoj, kiuj alvenis rekte al la bankkonto de KELI kaj estos ĝiritaj al LKK.

Rezulto 2016 kaj buĝetoj 2016, 2017 kaj 2018 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2016	Rezulto 2016	Buĝeto 2017	Buĝeto 2018
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.350	1.723,40	2.000	2.000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	0,00	0	0
Adopta Kaso	<u>400</u>	<u>375,86</u>	<u>400</u>	<u>400</u>
<i>Kotizoj entute</i>	<i>2.750</i>	<i>2.099,26</i>	<i>2.400</i>	<i>2.400</i>
Librovendado	50	27,00	50	50
Rentumoj	300	220,68	250	250
Profito el kongreso	<u>200</u>	<u>405,00</u>	<u>200</u>	<u>200</u>
<i>Aliaj enspezoj</i>	<i>550</i>	<i>652,68</i>	<i>500</i>	<i>500</i>
Enspezoj entute	3.300	2.751,94	2.900	2.900
Elspezoj				
Presisto kaj sendado de DR	2.600	2.763,00	2.600	2.600
Perantoj	<u>0</u>	<u>0,00</u>	<u>0</u>	<u>0</u>
<i>Revuokostoj</i>	<i>2.600</i>	<i>2.763,00</i>	<i>2.600</i>	<i>2.600</i>
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	150	150,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	<u>20</u>	<u>20,00</u>	<u>20</u>	<u>20</u>
<i>Estrarkostoj</i>	<i>260</i>	<i>260,00</i>	<i>260</i>	<i>260</i>
UEA-kotizo	65	64,00	65	65
Bankkostoj	250	239,65	250	250
Merituloj	50	22,00	50	50
UK Lukostoj	<u>50</u>	<u>0,00</u>	<u>50</u>	<u>50</u>
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	<i>415</i>	<i>325,65</i>	<i>415</i>	<i>415</i>
Librovendado (kostoj)	10	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	10	10
Rabatoj de Perantoj	<u>5</u>	<u>0,00</u>	<u>5</u>	<u>5</u>
<i>Aliaj elspezoj</i>	<i>25</i>	<i>0,00</i>	<i>25</i>	<i>25</i>
Elspezoj entute	3.300	3.348,65	3.300	3.300
Saldoj	0	-596,71	-400	-400

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2016 kaj la Buĝetoj 2017/2018

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj en 2016 estis malpli ol planitaj. Bedaŭrinde ankaŭ al la Adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis, kvankam pli ol en la antaŭa jaro. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui "laŭforte". Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

Aliaj enspezoj

Minimala librovendado okazis dum la jaro. La sumo de Rentumoj estis pli ol ni planis. La ĉijara kongreso okazis en Bratislavo kaj kunportis 405 EUR kiel profito.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2016 la kostoj estis la planitaj sumoj.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2016 estis la UEA-kotizoj kaj Bankkostoj.

Ni ankaŭ dankis per simbola donaco la laboron de merituloj.

Aliaj elspezoj

En la jaro 2016 KELI ne pagis aliajn elspezojn.

Saldoj

La saldo de la jaro 2016 estis bedaŭrinde negativa: - 596,71 eŭroj. La mal-altiĝo de la sumo de la Kotizoj kaj la Adopta kaso jam antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis, nia membraro maljuniĝas. Eblas, ke ni ankaŭ devas pripensi la eblecon de modesta kotiz-altiĝo, ĉar jam dum pluraj jaroj ni havas la saman kotizon. Bedaŭrinde dumtempe la presado, la poŝtaj kaj bankaj kostoj altiĝis. La financa bazo de KELI tamen daŭre estas akceptebla.

Buĝetoj


La Buĝetoj de la jaroj 2017 kaj 2018 estas en la Enspezoj planitaj malpli optimiste, kvankam ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian Ligon. Ni tamen pro la sekureco planas modestan negativan rezulton al la sekvontaj du jaroj.

La dresdena Sinjorina preĝejo

Kompilis Bengt Olof Åradsson, SE

Dum la kongreso ĉi-somere, la kongresanoj ekskursos al Dresdeno, kie inter alie troviĝas la impona Frauenkirche, la Sinjorina preĝejo. Ĝi estas evangelialutera preĝejo en centra Dresdeno. Ĝi estis konstruata inter la jaroj 1726 kaj 1743, laŭ plano de George Bähr, kaj ĝi havas unu el la plej grandaj ŝtonaj preĝejaj kupoloj norde de la Alpoj.

Dum la dua mondmilito, en februaro 1945, la preĝejo estis detruita pro la forta bombado de la aliancanoj. Dum la tempo de GDR ĝi estis konservita en ruina stato por memorigo de la milito. Post la turniĝo de la politika sistemo, la preĝejo estis rekonstruita inter la jaroj 1994 kaj 2005. Nuntempe la preĝejo ankaŭ funkcias kiel simbolo de repaciĝo inter antaŭaj militmalamikoj.



La rekonstruado estis financita pere de mondonacoj de multnombraj kaj multspecaj donacintoj. Pri tiu mirinda okazaĵo, estas verkita libro, *La Dresdena Sinjorina preĝejo*, de Jürgen Helfricht. Ĝi troviĝas en esperanta traduko de Benoît Philippe. La libron eldonis Kava-Pech.

Kovrilpaĝo de la esperanta traduko

Verkinto: Jürgen Helfricht

Tradukinto: Benoît Philippe

Originala lingvo: germana

Paĝoj: 86

Eldonjaro: 2013

Pezo: 221 g

ISBN: 978-80-87169-42-1

Informoj

Nova membro en USONO – Andrew YOUNG

Mi loĝas en Aŭstino, Teksaso, Usono. Mi eksciis pri Esperanto dum mia tempo ĉe la Universitato de Teksaso antaŭ dek jaroj. Mi studis lingvistikon ĉe la universitato kaj mi volis lerni “artefaritan” lingvon. Mi decidis lerni Esperanton ĉar ĝi havas la plej grandan komunumon.

Poste dum mia tempo ĉe la universitato, mi iĝis studenta pastro de Unuiĝinta Eklezio de Kristo (en Usono) kaj studento ĉe la Aŭstina Presbiteriana Teologia Seminario kie mi studis teologion. Mi diplomiĝis la 21an de majo. Mi ankaŭ estas asistanta pastoro ĉe Triunua Kirko de Aŭstino. Mi anticipas ke mia eklezio ordinos min je decembro.



Mia retpaĝo estas <http://pastro.us> kaj mia Tvitero estas <https://twitter.com/pastroandreo>



Redaktoro,

mi dankas pro la nekrologo pri Frans-Georg Rössler en DR, ties tradukojn de poemoj de Rose Ausländer mi ege ŝatas.

Mi proponas la memorigon al la poemaro en kristanaj fontoj. Oni sekvu sub la gvidvorto trezorejo al perloj de la literaturo.


Salutas Siegfried

Ps.: En mia komunumo ni havas ĵus ekspozicion pri Luther kaj la Judoj.

Tio rilatas ankaŭ al la malnova testamento kaj Jesaja. Dankeme mi relegis mian kontribuon citinte ankaŭ Jesajan kaj Jesuon, kiu estis judo. Ĉu Luther forgesis tion?

Leteroj de Ludoviko Zamenhof

Estimataj! Okaze de la 100-a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof ni skanis kaj publikigis 19 originalajn korespondaĵojn de Ludoviko Zamenhof. Ili estas libere kaj senpage legeblaj sur la retejo de la Esperantomuzeo kaj de la Kolekto por Planlingvoj.



Parto de poŝtkarto al Theodor Čejka 1906

Trovu la skanitajn korespondaĵojn ĉe www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/arkivajoj/

Laŭpove ni estontece skanos kaj publikigos pluajn malnovajn arkivaĵojn el la Esperantomuzeo en Vieno.

Korajn salutojn kaj bondezirojn, Bernhard Tuider

Karaj,

Hodiaŭ mi estis en la ING-banko. La konto de KUNE estas fermita. Mi sentas min respondeca por la bona malfondo de KUNE. Laste mi denove informos la KUNE kaj KELI-membrojn. K.U.N.E. estis fondita en januaro 1932 kun 300 membroj. Vidu "Nia Historio". Bonvolu menciu en Dia Regno la malfondon.

Kore salutas, Els

Estimataj,

mi informas, ke mi ricevis la konfirmon por la preĝejo (dum UK) kiu situas ĉirkaŭ 10 min piede for de la kongresejo. Nun ankoraŭ mankas konfirmo, ĉu la loka koruso kontribuos per 1-2 kantoj.

La Ekumena diservo okazos dimanĉon, la 23an de julio je la 14a horo.

Amike, Marija Belošević



Wim BARIS

1 okt. 1944 – 23 apr. 2017

La 23-an de aprilo forpasis post longa elĉerpa malsano nia membro Wim Baris. Li estis instruisto pri la nederlanda lingvo en mezlernejo. Juna li ekkonis Esperanton gastloĝante ĉe sia onklino Van der Waal en Amsterdam. Jam baldaŭ li aliĝis al K.U.N.E. (Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj) kies Roterdama sekcio bonvenigis lin kiel Libroserviston. En la K.E.L.I.-kongreso de 1964 li konatiĝis kun la juna Benata Koopmans kaj alia juna membrino Ina Verdouw.

Mi konatiĝis kun li en 1967 post mia aliĝo al K.U.N.E. kaj K.E.L.I. Li estis erudiculo pri Esperanto-literaturo. Ekde la 1970-aj jaroj pro malsano ekzistinte el la la instruado, Wim dediĉis multan tempon al la biblioteko de la Centra Oficejo de UEA. Li aktive ĉeestis aranĝojn de K.U.N.E. kaj Internacia Esperanto Instituto.

La funebran solenaĵon li aranĝis kun la predikantino kaj amikino, inkluzive bibliajn kaj Esperantajn tekstojn kaj muzikon. Rob Moerbeek povis klarigi pri Esperanto kaj la rolo kiun ĝi ludis en la vivo de Wim. Multaj esperantistoj ĉeestis la funebran ceremonion.

Unu el la tekstoj de funebra anonco estis jenaj linioj de Zamenhof en Esperanto kaj la nederlanda lingvo:

*Silentas nun ĉiuj disput' relegia
kaj regas nun kredo de koro.*

Els van Dijk-Kuperus kun la helpo de i.a. Benata Hengstmengel Koopmans kaj Rob Moerbeek. La lasta afable permesis min ĉerpi informojn el lia funebra teksto.



La 25-an de aprilo 2017 mortis en Prago en la aĝo de 90 jaroj konata operkantisto Miroslav SMYČKA. Li ofte koncertis dum diversaj E-aranĝoj kaj ankaŭ dum niaj KELI kongresoj en Ĉeĥio. Li restos en mia memoro.

Pavel Polnický

Ni familianoj, ege funebras pro la forpaso de nia bofratino kiu jam mortis la 16an de februaro 2017. Krome en nia familia apudeco mortis Policano Ndimubanzi kaj virino de mia grava amiko Pastoro Kimburu loĝanta en Monto Golgota.

Honoré Sebuoro

Bone, ke mi Kriston havas

WOHL MIR, DASS ICH JESUM HABE



1. Bo-ne, ke mi Kris-ton ha-vas,
ke Li en mal-ĝoj' min ra-vas.



Lin, la ĝu-on de l' a - nim',
Do mi fir-me te - nas Lin.



Bo-ne, ke Li di - a - ko-nas,



kaj kun am' al mi sin do-nas.



Mi ne - ni - am la - sos Lin,



fir - me te - nos Lin ĝis fin'.

2. Restas Krist' la ĝoj' de l' koro,
graco, amo kaj bonvol';
en anksio, en doloro
vivo-suko kaj konsol'.
Por l' okuloj Li la suno,
por l' anim' trezor' kaj lumo.
Tial, kiel Li en mi,
tiel restos mi en Li.

WOHL MIR, DASS ICH JESUM HABE • M: Johann Sebastian Bach, 1723 en la kantato *Herz und Mund und Tat und Leben*, BWV 147, originale G-majora, por 4-voĉa koruso kaj instrumentoj • germana T: Martin Jahn, 1661 aŭ 1668 en *Jesu, meiner Seelen Wonne*, strofoj 6 kaj 10 • E: Albrecht Kronenberger 2017-03-12